LA VERDA LUPEO
FENIKSO

N-ro 46 | 1979/3 Septembro | 10a jaro

# Kluba informilo de ELF–AREK

## ELF: Esperanto Ligo Filatelista

## AREK: Amika Rondo de Esperantaj – Kolektantoj

Absender Dr. Giso Brosche

DDR-7981 Rückersdorf
Postleitzahl

Im Walde

G.D.R
(Straße und Hausnummer oder Postfach bzw. Postschließfach)

"Ekzistas historiaj notoj, ke . . . la roma filozofo kaj medicina scienculo

Claudius Galenus

ankaú konstruis iun sistemon de signoj por preciza komuniko de diversaj ideoj."

El: E. Drezen, Historio de la Mondolingvo

III 18 185 Ag 400

Postkarte
Carte postale




Centra Laborrondo
Esperanto

108 Berlin
Postleitzahl

Charlottenstr. 60

(Straße und Hausnummer oder Postfach bzw. Postschließ...

## ELF-AREK-kunveno en la 64a UK

Dum la 64a UK en Lucerno okazis je la 30a de julio 1979 kunsido de nia klubo en la salono Hodler. Prezidis ĝin nia membro Lech Kosieniak el Varsovio, kongresnumero 29. Partoprenis ĉirkaŭ 50 kolektantoj de Esperantaĵoj. En la kunsido oni informis pri kongresaj filatelaĵoj kaj pri aliaj novaj E-filatelaĵoj, pri organizaj problemoj kaj estontaj planoj.

Nia membro Richard Hirsch, kongresnumero 24 en sia diskuto substrekis la neceson fiksi la valoron de niaj E-poŝtstampoj en novaperonta stamp-katalogo. Sinjoro Laederdach el Svislando proponis, fiksi nian kotizon en konkreta mono, ekz. en svisaj frankoj au svedaj kronoj. Sinjoro Dazzini (Kn 96) proponis listigi la Esp.-kolektojn por povi aranĝi komunan ekspozicion en San Marino, kie por tio ekzistas realaj eblecoj.

La partoprenantoj decidis, ke ELF danku al la svisa poŝto pro la eldono de la E-filatelaĵoj, ke ELF strebu, ke la sveda poŝto eldonu similajn filatelaĵojn okaze de la 65a UK en Stokholmo. Ili kun ĝojo konstatis, ke la brazila poŝto intencas aperigi okaze de la 66a UK 1981 E-pm kaj E-stampon.

Oni proponis, okazigi 1980 membro-kunvenon de ELF-AREK aŭ en Leipzig/ GDR dum marto, aŭ en la kadro de la 65a UK en Stokholmo.

*(El raporto de Kosieniak al redaktoro)*

# 64-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO




# Kongresa Kuriero 5




### La kongresa stampo de la 64a UK

Dum la tuta daŭro de la kongreso la svisa poŝto uzis la saman unusolan poŝtstampon 28.7-4.8.79 sen alia datstampo. Temas do pri nuliga memoriga stampo.

La Luzern-informojn donis nia amiko Kosieniak, dankon al li!

**Filatelaĵoj en Lucerno**

Oni vendis dum la 64a UK la jenajn menciindajn filatelaĵojn:

- E-pm o aŭ ++ = 0.90 sv. fr.
- UTK = 1.80
  UTK kun 4 pm = 4.50
- Kgr-kov 21.2.79 = 1.80 (Bern)
  Kgr-kov 21.2.79 = 1.80 (Luzern kun varbstampo)
- FDC kun kgr-sta = 1.80
  FDC kun kgr-sta = 4.50 (kun kvarbloko)
- Maksimumkarto E-balono 21.2.79 = 1.80
- Maksimumkarto E-balono kgr-sta = 1.80
- Maksimumkarto sen pm = 1.00
- Balon-koverto kun div. afrankaj variaĵoj inter 6 ĝis 9 fr.

Ni do konstatas, ke la svisa poŝto aperigis la jenajn poŝtaĵojn: Poŝtmarkon, UTK, varbstampon (mankas al redaktoro) kaj la nuligan memorstampon. Krome la svisa poŝto donacis al la komitatanoj de UEA kaj al la oficialaj kongresaj gastoj specialan 4-paĝan salutfolion kun 2 pm (800 jaroj Luzern kaj E-pm). Eldonkvanto eble 200 folioj.

## 2-a IMEK Hodmezövasarhely 1979

Ornama apudstampo memorigas pri la 2-a IMEK, kiu okazis en la sudhungara Hodmezövasarhely. Do, oni nur tenas korektan filatelaĵon en la manoj, kiam la ornama apudstampo pozas *apud* la pm, dum sur la pm situu la normala nuliga datstampo. La stampokuseno en la konferenceja poŝta giĉeto enhavis nur nigran inkon. La stampilo estis nur dum unu tago en uzo.

130 E-medicinistoj partoprenis tiun IMEK-on, majstre organizita de samideanino Katalin Farago.

En la standoj de la konferencejo troviĝis jenaj por ni interesaj esperantaĵoj:

- ronda ŝtofa insigno de IMEK
- ceramika medalo pri IMEK
- plastaj saketoj kaj
- T-shirt-oj kun IMEK-emblemo





**Presita kaj stampita Luzern-stampo?**

Inter ricevitaj Luzern-stampoj de la 64a UK mi trovis ankaŭ apud manstampitaj memorstampoj presitajn stampojn. La presitan mi trovis sur dum UK uzita FDC supre en maldekstra angulo. La pm de tiu koverto estis nuligita pere de mane stampita stampo. Kiu povas klarigi tiun aferon? Bv. informi redaktoron.

**Finsterwalda IMEK-sta en tri koloroj!**

Por niaj "kolor"specialistoj" interese, ke tiu stampo aperas en tri koloroj: viola. brun-nigra (5.7.) kaj blu-nigra (10.7).




## Finsterwalde/GDR kun IMEK-stampo

Pri la 2-a IMEK en Hungario atentigis nuliga memorstampo en urbeto Finsterwalde-GDR. En la stampo estas germanlingva teksto pri la IMEK en H'hely kaj portreto de Claudius Galenus. Pri li ekzistas historiaj notoj ke li verkis sistemon por internacia interkompreniĝo.

La metalan stampilon uzadis la loka poŝtoficejo de 4–10.7.1979. La stampo ekzistas en du koloroj: nigra kaj viola! La nigran uzis la giĉeta oficisto kaj la violan la poŝteja estro en sia buroo. Violaj raras.

La stampon mendis la Medicina Fakrondo en CLE de Kulturligo de GDR. Desegnis ĝin d-ro Giso Brosche, prezidanto de la MF en CLE. Estis ankaŭ li, kiu iniciatis preson de alpresoj sur poŝtaj kartoj pri Galen. (La tuta stoko havas stampojn, neuzitaj ne plu ekzistas.) Dankinde d-ro Brosche prizorgis kvanton da stampoj por la kolektantoj.

**Finsterwalde-stampoj haveblaj**

1) stampitaj kartoj kun Galen-surpresoj
2) stampitaj kovertoj kun surpreso: "Medicina Fakrondo en Centra Laborrondo Esperanto"
3) registritaj kartoj kun Galen-surpresoj
4) registritaj kovertoj ("Medicina Fakrondo . . .")
5) restritaj kovertoj ("Medicina Fakrondo . . .") adresitaj al IMEK en Hungario kun alvena IMEK-stampo de H'hely. (Du div. E-stampoj poŝte normale uzitaj sur unu koverto!)

Prezoj: n-roj 1+2: 3 IRK po peco
n-ro 3+4: po peco kurinta pk au kov kun porteta stampo pri medicinsto (ekz. eldonitaj okaze de la ĉiujaraj Ärztetag-oj en FRG)
n-ro 5: kov au pk de Ärztetag FRG 1976 pri medicinisto Burdach au: stampo pri Lorenz Oken el Freiburg.

6) IMEK-stampo de H'hely sur kovertoj "Med. Fakrondo . . ."
Prezo: ŝanĝe kontraŭ primedicina stampo sur kov au pk.

Adreso: Doktoro Giso Brosche, DDR 7981 Rückersdorf

**IREN-stampo en nova vesto**
El Abaliget en Hungario atingis min poŝta karto kun la ĉi-jara IREN-stampo. Feliĉe en nova vesto kun plaĉa aspekto. Admirenda samideanino Elizabeta Pallos, kiu per ĉiam nova energio organizas la IREN-ojn.

**Nova malnov-vesta SEU-stampo**
Organiza komitato de SEU en Gyula ĉi-jare denove mendis de la poŝto la memorigan stampon pri la Somera Esperanto Universitato.

**Denove pri perfino:**
. . . kiel kolektanto de nederlandaj filatelaĵoj mi posedas la perfinon GUSTO. En perfina katalogo, eldonita 1976 de s-ro Enschedim en Nederlando, ĝi troviĝas sub numero "G-33". La teksto diras pri ĝi: "Werf GUSTO, firmao A.A. Smulders, Schiedam".

Mia perfino estas sur la pm Zumstein 157, kaj la dato de la poŝta stampo estas la 21.IV.1927 (Schiedam).

*– Josef Fejgl, Hradec Kralove– (el "Zpravodej" 1-79)*

**Leipzig, GDR**
La IFER-79 stampon uzadis la urba ĉefa poŝtejo de 9–14.3.1979. Poste la stampilo estis dum 2 monatoj de dispono por komplezaj stampoj. Sed nur kun dato 14.3.79. La IFER-renkontiĝo daŭris de 9–11.3.79. Partoprenis ĉirkau 150 personoj, inter ili 3 el niaj klubanoj: Hasala, Hirsch kaj Burmeister. Okazis E-filatela ekzpozicio. Havebla estis speciala metala IFER-insigno. La stampo estas en nia stampobanko.

**Kungälv, Svedujo**
Svedujo havas sian 23-an poŝtan E-stampon. 2–4 junio 1979 en Kungälv okazis la jarkongreso de la Sveda Esperantoasocio. La OK aperigis salutkarton kaj specialan glumarkon. En nia stampobanko haveblas tiu ĉi nova stampo.

**Szeged, Hungario**
La 66-a hungara poŝta E-stampo venis el la sud-orienthungara Szeged, fama pro siaj fiŝsupo kaj "Szegedin-gulaŝo". Departementa E-Ligo okazigis la 11an pacrenkontiĝon esperantistan kaj por ĝia popularigo mendis ĉe la poŝto memorigan stampilon kiu montras forĝiston kun martelo kaj amboso.

**Fervojistoj en Miŝkolc**
Sur titola paĝo de nia n-ro 43 vi povis vidi glumarkon pri la hungara fervojista E-renkonto 1979 en Miŝkolc (pentagona). Nun la hungara poŝto uzis tute samaspektan stampon.

Lkk ankaŭ aperigis:
- rektangula plasta insigno
- flageto pri la renkontiĝo
- plastaj saketoj
- du diversaj glumarkoj (vidu titolpaĝo n-ro 43)
- memoriga karto

## Zamenhof-monero

En la serio de polaj moneroj sub la nomo "Grandaj poloj", antaŭ du monatoj (majo 1979) aperis arĝenta 100-zlota monero kun la portreto de d-ro L.L. Zamenhof. Unuflanke de la monero aperas la blazono de Pollando kaj aliaj kutimaj indikoj de la Pola Nacia Banko. Sur la flanko kun portreto de Zamenhof, rigardanta maldekstren, troviĝas ĉirkaŭa surskribo "Ludwik Zamenhof 1859–1917". La monero pezas 16,5 gramojn kaj havas diametron de 32 milimetroj. Emisiita ĝi estas en la malgranda eldonkvanto de 30 mil ekzempleroj kaj certe fariĝos numismatika raraĵo. La moneron projektis Stanislawa Watrobska, kaj ĝin produktis la ŝtata monfarejo en Varsovio.

*El: esperanto, julio/79*

## Stampoj GER 1

De ĝi ekzistas nur 2 variaĵoj anstataŭ 3, kiel antaŭ nelonge ni supozis kaj eĉ katalogis. Ekzistas kovertoj kun tiu maŝinstampo, kiuj montras la stelojn kun kaj sen kadroj aŭ parte kun kadroj. Tio klare pruvas, ke tiu "variaĵo" naskiĝis el longtempa uzado, kiu platigis la reliefon de la stampilo kaj tiel ankaŭ malaperigis la kadron ĉirkau la stelo. Do. ekzistas
GER 1-1, kun datstampo de Ø 25 mm
GER 1-2, kun datstampo de Ø 27 mm

## Ne nur por hokistoj "T-Shirt"

Internacia Fiŝhokista Esperanto Klubo havas ne nur sian belegan IFEK-insignon sed ankaŭ sportan trikoton kun la sama emblemo presita sur ĝi. Entute tre plaĉa afero por libertempado kaj fiŝhokado. Mendojn peras la redaktoro al IFEK. (Prezo ankoraŭ ne konata).



# ELF – AREK

"La verda lupeo"
"Fenikso"

ESPERANTO LIGO FILATELISTA – ELF
Amika rondo de Esperantaj-kolektantoj (AREK)

STAMPO-EKKETO: Mi havas jenajn stampojn sur pk aŭ koverto: = "Kiom?"
Notu sub la linio! Ne forgesu skribi la adreson dorsflanke

AR: 1 2 3 4 AU: 1 2 3 4 5 6 7 8 9 10 11 12 13 14 15 16 17 18 19

BE: 1 2 3 4 5 6 7 8 9 10 11 12 13 14 BU: 1 2 3 4 5 6 7 8 9 10

BRA: 1 2 3 4 5 6 7 8 9 10 11 12 13 14 15 16 17 18 19 20 21 22 23 24 25 26 27 28 29

BRI: 1 2 3 4 5 6 7 8 9 10 11 12 CS: 1 2 3 4 5 6 7 8 9 10 11 12 13 14 15 16 17 18 19

DA: 1 2 3 4 5 6 7 8 DG: 1 2 FI: 1 2 3 4 5 GER: 1-1 1-2 2 3 GDR 1 2 3

FRA: 1 2 3 4 5 6 7 8 9 10 11 12 13 14 15 16 17 18 19 20 21 22 23 24 25 26 27 28 29 30

FRA: 31 32 33 34 35 36 37 38 39 40 41-1 41-2 42-1 42-2 43 44 GRE: 1 2 3

HI: 1 2 3 4 5 6 7 8 9 10 11 12 13 14 15 16 17 18 19 20 IS: 1

GFR: 1 2 3 4 5 6 7 8 9 10 11 12 13 14 15 16 17 18 19 20 21 22 23 24 25 26 27 28 29 30

HU: 1 10 20 30

HU: 31 40 50 60 61 62 63 64

ÎT : 1 . 10 20 21 22 23 24 25 26 27
1

JA : 1 10 20 21

JU : 1 2-1 2-2 3 4-1 4-2 5 6 7 8 9 10 11 12 13 14 15-1 15-2 16 17-1 17-2 18 19 20 21 22 23 24 25

LU : 1 2 MO: 1-1 1-2 1-3 1-4 NE: 1 2 3 4 5 6 7 8 9 10 11 12 13 14 15 ND: 1 2 3 4

PD : 1 5 6 7 8 9-1 9-2 9-3 9-4 10 15 . . . . 20 25 . . 30

" 31 35 . . . . 40 . . . . 45 . . . . 50 . . 55 60

" 61 65 70 75 80 85 90

" 91 95 100 105 110 115 116 117 118

" 39-1 39-2 -3 -4 -5 -6 -7 -8 -9

RSM : 1 2 SU : 1 SVE: 1 2 3 4 5 6 7 8 9 10 11 12 13 14 15 16 17 18 19 20 21 22

SVI : 1 2 3 4 5-1 5-2 6 7-1 -2 -3 -4 -5 -6 -7 -8 -9 -10 -11 -12 -13 8 VS 1 2

MALTA 1 PORT 1 /Ne forgesu! Ensendu ĝin tuj.

Bonvolu plenigi kaj sendi al la redaktoro de "la verda lupeo" "Fenikso" !
Rudolf Burmeister, W. Firl-str. 30. DDR-9047 KARL MARX STADT

## Afrankstampo ZAMENHOF DREEF

1974 en la nederlanda Utrecht oni finkonstruis grandan "butiko-centron" en la Zamenhofdreef (dreef-aleo). Trovis lokon en ĝi sidejoj de multaj firmaoj. Unu el tiuj firmaoj, DERKS & PARTNERS ADVOCATEN, por la korespondado siatempe komencis uzi afrankmaŝinon, kiu i.a. havas en la teksto la nomon ZAMENHOFDREEF. Dum jaroj do tiu afrankstampo restis kaŝita al ni Esperanto-filatelistoj.

Povas esti, ke ankaŭ aliaj firmaoj en tiu Zamenhofdreef uzas afrankmaŝinojn, kiuj tiukaze same enhavus mencion pri Zamenhofdreef. Tion eltrovi, estas tasko por niaj s-anoj en Utrecht. Unu el ili, sinjoro Punt, bonvolis por ni esplori la aferon ĉirkaŭ la ĵus trovita afrankstampo.

*– Red. –*

## CS 1-2 en du variaĵoj

Ekzistas du tipoj de CS 1-2 (13a UK Praha). En la unua tipo la horo en la dat-indiko estas indikita arabcifere (ekz.: 12), tiu stampo relative ofte estas en niaj kolektoj.

En la dua tipo la horo en la dat-indiko estas indikita romancifere (ekz.: XI-). Tiu tipo estas ŝajne ege rara kaj nur nun trovita! Ambaŭ tipoj havas en la suba segmento literon "b".

En la dat-indikoj de la stampo CS 1-1 (kun litero "a") ni ankoraŭ ne trovis supre cititajn diferencojn. Tial nepre kontrolu viajn stampojn CS 1-1, ĉu ili eventuale ankaŭ havas tiujn variaĵojn. La sciigon pri ĉi afero ni trovis en "Zpravodej", informilo de la Esperanto-Sekcio ĉe komisiono de tema filatelio de Asocio de ĉeĥaj filatelistoj, kie nia membro Bartoŝik skribis pri tio.

### Nova glumarkoj de la E-centro Paderborn




## Stampoj GFR 3-1 kaj 3-2

Nia klubano kaj amiko Werner Simon skribis, ke li trovis enskribon sur la poŝtkartoj kun tiuj stampoj, kiu klarigas ilian uzon: La karto kun la stampo 3-1 (München 1948) estas el la speciala kongresa poŝtoficejo en kongresejo. Stampo 3-2 estis uzita en la "gazetara ekspozicio" (Deutsche Presse Austellung), kiu okazis de majo ĝis junio en München kaj ankaŭ havis specialan ne – E-poŝtstampon.

## Novaj glumarkoj

Esperanto-Centro en Paderborn eldonis vicon da glm:

- Zamenhof 1859–1917
- Menil 1860–1930
- Saussure 1872–1943
- Stojan 1884–1961
- Steiner 1878–1969
- Sinha 1905–1977

Ili aperas en kunpresa bloko de ses diversaj glm.

Dua kunpresa bloko de ses diversaj glumarkoj notas vortojn el la Biblio de Mateo.

Aldone E-Centro aperigis la samajn glumarkojn, kiuj nur havas la tekstan kadron, sed kun blanka meza kampo por noti adresojn k.s. (Ruĝa, blanka kun verda stelo).

Havebla de: Esperanto-Centro, D-4790 Paderborn, Box 1450
folio kun 6 markoj: 0.80 gmk.

31a IFEF-kgr 1979 en Turku – Finnlando
32a IFEF-kgr 1980 en America – Nederlando
64a brita kgr 1980 en Edingburgh – Britio
Agado E 3 (Blinduloj vidas)
38a IKUE-kgr 1979 en Luksemburg
52a SAT-kgr 1979 en Swanwick
Sveda jarkongreso 1979 en Kungälv – Svedujo
44a E-kongreso 1979 en Masterton (NZ)
IFER 79 1979 en Leipzig – GDR
Fervojista E-renk. 1979 en Miskolc – Hungario

## Pagi kotizojn per esperantaĵoj

Por la jaro 1980 denove eblas, pagi la kotizon pere de Esperantaĵoj. (Insignoj-glumarkoj-poŝtstampoj) Interesuloj sin bonvolu turni al nia membro
Richard Wluka, D-3000 Hannover 21, Bremer Str. 8
kiu aranĝas la aferon (post antaŭa interkonsento).

## Strato Esperanto en Szeged, Hungario

Dum mia ĉi-jara tendumado en la idilie situanta kampadejo Martely apud Hodmezövasarhely mi ne fidis al miaj okuloj, kiam en fatrasujo mi ekvidis aron da kovertoj, kiuj sen poŝtmarkoj estis poŝte stampitaj en Szeged kaj havis la adresstampon de la sendinto kun indiko pri Eszperantó u.

La kompleta teksto de tiu adresstampo:
SZAKSZERVEZETEK – CSONGRAD – MEGYEI TANACSA
Szeged, Eszperanto u. 3-5

Tie, kie kutime pozas pm, pozis stampo "Dijelölegen", eble "tarifo pagita"? Senditaj la kovertoj estis al s-ro Lajos Bihari, kampadeja estro.

Kompreneble, ke mi la kovertojn elfatrasujigis kaj enalbumigis por utiligi ilin por filatelaj ekspozaĵoj pri E.

## Esperanto-insignoj . . .

2-a IMEK, Hodmezövaserhely 1979
ŝtofa insigno

ASE-fondiĝkunveno, Moskvo 1979
(vidu fotojn en "Moscow NEW WEEKLY" – nro 16-1979)

15-a Feriado, Miedzygorze 1979
"feria insigno"

30 jaroj PEA en Wroclavo 1978
plasta insigno

63-a UK, Varna 1978
kongresa insigno

34-a TEJO-kgr, Tirnovo 1978

3-a E-konferenco,
GDR-Rostock 1978
plasta insigno

IFER, Leipzig 1978
ronda papera insigno

IFER, Leipzig 1979
ronda metala insigno

Renkontiĝo motor.
E-istoj Otmuchov 1977
plasta insigno

Hungarlanda fervoj.
E-renk., Miskolc 1979
plasta insigno

Karaj klubaj geamikoj,
informu nian redaktoron pri E-insignoj uzataj en via lando. Tiel ni povas listigi la insignojn en nia informilo kaj faciligi al la insigno-kolektantoj la kolektadon.




## II-a borso de Esperantaj Insignoj

Dimanĉo, la 9-an de septembro je la 10-a horo okazos en Miedzygorze la Dua Borso de Esperantaj Insignoj, dum kiu kolektantoj havos okazon interŝanĝi insignojn.

La borso okazos en la kadro de la 15-a Internacia Esperantista Feriado.
*(El informilo 155/79 de PEA, filio en Vroclavo)*

## Sanskrit = artefarita lingvo

23–30.5.1979 okazis en Weimar, GDR, tutmonda sanskrita konferenco de la I.A.S.S. kaj la poŝto uzis memorigan ovalan datstampon dum la daŭro de la konferenco.

Estis dro Brosche, kiu min atentigis pri tiu stampo kaj vere mi estas danka al li.

La sanskrit-stampo estas bone uzebla en filatela ekspozaĵo pri Esperanto, ĉar laŭ miaj modestaj scioj sanskrito estas artefarita el multaj hindaj dialektoj lingvo. Estus interese, ekscii pliajn detalojn ĉirkaŭ tiu sanskrito. Kiu el ni tion kapablus rakonti al ni?

## Gratulon ZPRAVODAJ!

ELF-AREK sendas korajn gratulojn pro 10a naskiĝjaro al ZPRAVODAJ-informilo, kiun eldonas "Esperanto Sekcio ĉe Komisiono de tema filatelio de Asocio de ĉehaj Filatelistoj".

Feliĉe tiu informilo ne restis t.n. "unutaga muŝo" sed ĝis hodiaŭ kontinue informas E-filatelistojn en CSSR pri E-filatelaĵoj en ĉeha lingvo kaj en nia komuna internacia.

Niaj klubanoj Hasala, Bartoŝik kaj Jakubec estas la koro de tiu nia frata revueto.

En la tutmonda filatela ekspozicio "PRAGA 78" Zpravodaj en la literatura konkura klaso ricevis plakedon de la ekspozicio.

Ni estas tute certaj, ke dank' al niaj entuziasmaj amikoj en CSSR tiu informilo ankaŭ estonte servas al la E-filatelistoj en CSSR.

*Ivar Paulsson*
prezidanto ELF-AREK

*Rudolf Burmeister*
redaktoro de
LA VERDA LUPEO-Fenikso

## ELF-AREK kunvenos 1980 en Leipzig

En marto 1980 ni intencas aranĝi kunvenon por niaj membroj en Leipzig/GDR. La kunveno okazos en la kadro de IFER 1980. (Internacia Foira Esperantista Renkontiĝo) Ni planas kunveno dum tri tagoj. Interesuloj povas resti pli longe kaj viziti la mondfaman specimenan foiron de Leipzig.

Sian partoprenon jam promesis niaj amikoj Paulsson, Heimlich, Hirsch, Hasala, Kosieniak kaj Burmeister.

Pliajn detalojn pri nia ELF-AREK-kunveno vi trovos en nia 1979/4-informilo.

## Demandoj – Respondoj

"En kiu ne-esperanta katalogo eblas trovi la bavaran kun kupono, la kvar sovetuniajn surpresitajn el faŝistgermana okupado, hungaran k polajn tutaĵojn?"

= La bavaran vi povas trovi en Michel, Bayern, R 14
(R-reklammarkoj en la fino de bavaria listigo)
La sovetuniajn vi same trovas en Michel, Alexanderstadt (Bolŝaja Alexandrovka)
Pri tutaĵoj nur informas koncernaj nacilingvaj katalogoj kaj nacilingvaj filatelaj gazetoj.
Ekzistas ĉ. 600 E-tutaĵoj. Baldaŭ aperos E-lingva katalogo de V. Vana pri ili.

"Kia estas la diferenco inter jugoslavaj kaj triestaj E-pm?"

= Triestaj E-pm havas ruĝan surpreson STT VUJNA

". . . daŭre en FENIKSO mi legas 'ekspozi'. Tiu vorto ne estas en PIV kaj devus esti 'eksponi'."

= Ne troveblas en PIV nocio 'eksponicio' sed 'ekspozicio', tial ni filatelistoj preferas uzi la jam delonge enmodiĝintan 'ekspozi' anstataŭ tiun 'eksponi'. Do: ni ekspozas niajn ekspozaĵojn en ekspozicioj. 'Eksponi' ni lasas al la fotistoj.

## Stanislav Kostka Neumann elstara Esperantisto

La 9an de decembro 1902 estis fondita en Praha la Esperantista Klubo, en kies unuan komitaton estis elektita ankaŭ elstara kaj fama ĉeha poeto S.K. Neumann, kiu post la dua mondmilito estis honorigita per la titolo "Nacia Artisto".

Honore al lia multflanka kultura agado eldonis la ĉehoslovaka poŝto en la jaro 1950 du poŝtmarkojn kun lia portreto, valoroj 1.50 kaj 3.00 kronoj (Zumstein 546 kaj 547), kun UTK kaj okaza poŝta stampo PRAHA 1–5.6.1960. Tiuj filatelaĵoj estas bone uzeblaj por E-filatelistoj en E-filatelaj ekspozaĵoj.

S.K. Neumann estis ankaŭ filatelisto. La filatela klubo en la urbo Podebrady, kies membro li estis, portas nun lian nomon. Neumann vivis de 5.6.1875 – 28.6.1947.

*(El Zpravodaj n-ro 28)*

## Suplemento por via stampokatalogo:

| | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|
| BRI | 13 | Swanwick | 1979 13–20.7 | SAT-kgr 52-a | 5-eĝa |
| FRA | 45 | Cerny | 1979 31.3 | Parizregiona E-kgr | 36 |
| GDR | 3 | Leipzig 1 | 1979 9–14.3 | Int. Foira E-renk. | 40 |
| GDR | 4 | Finsterwalde 1 | 1979 4–10.7 | IMEK 2-a (Galen) | vi ni 40 |
| JA | 22 | Kobe | 1979 11–12.8 | 66a kgr de japana E-istoj | 32 |
| SVE | 23 | Kungälv | 1979 2.6 | Sveda jarkongreso | 30 |
| SVI | 9 | Luzern 2 | 1979 1–28.2 | 64a univ. kgr de esp. | ms 33x19 |
| SVI | 10 | Luzern | 1979 28.7–4.8 | UK 64a | 32 |
| HU | 66 | Szeged | 1979 20.5 | 11a pacrenkontiĝo | 34 |
| HU | 67 | Miskolc | 1979 30.6 | Fervojista E-renkonto | 5-eĝa |
| HU | 68 | Gyula | 1979 8.7 | SEU 1979 | 27x37 |
| HU | 69 | Hodmezövasarhely | 1979 9.7 | 2a IMEK | as 24 |
| HU | 70 | Abaliget | 1979 16.7 | IREN 12a | 35 |
| LUK | 2 | Luxembourg 1 | 1978 4–9.9<br>1979 7–14.8 | E-Int. Lingvo<br>(sama okaze de 38a IKUE-kgr) | ms 40x20 |

Bonvolu kontroli la datojn sur viaj posedaĵoj.
Vidu ankaŭ la suplementojn por stampokatalogo en n-roj 43 k 44 de nia Fenikso-la verda lupeo.

## Dankon al niaj geamikoj

Stifter en Sudafriko (80 IRK), Hirsch en FRG (38 IRK). Demmendaal en Nederlando (30 IRK). Wluka (10 IRK). Veen (10 IRK). Heimlich (ELF-AREK-kotizo en UEA 1979). Krom tio nia amiko Heimlich metis konsiderindan sumon el la "profito" de la stampobanko en nian komunan ELF-AREK-monujon.

Krome ni dankas al ĉiuj tiuj niaj klubaj gemikoj, kiuj sendis informojn pri novaĵoj al la redaktoro.

Do momente ni staras sur tute sana fundamento dank' al la solidareco inter ni E-filatelistoj. Sen tia solidareco au reciproka helpo certe ni povus fermi niajn albumojn, ĉar pri novaĵoj nur hazarde ni ion ekscius.

Kotizojn k donacojn bonvolu ĉiam sendi al Paulsson. Mi nur akceptas kontribuaĵojn k informojn por nia informilo.

*– Redakcio –*

**Prezidanto de la ELF-AREK-Klubo:**
Ivar Paulsson, S-171 33 Solna, Algatan 3
Al li sendu la kotizon de 15 IRK (stampitaj post 1.1.1976) aú 25.– svedajn kronojn – poŝtkonto 51 57 85-4 – I. Paulsson, Solna.
Ankaú per esperantaĵoj eblas kotizi.
Pri tio detalojn interne de ĉi informilo.

**Redaktoro de la kluba informilo:**
R. Burmeister, DDR-9047 Karl-Marx-Stadt, W.-Firl. Str. 30
Al li sendu ĉiujn informojn por la informilo.

**Stampobanko kaj vicprezidanto;**
Werner Heimlich, D-304 Soltau, Fröbelstr. 4

---

ini Onda
7023 Leipzig
P.f. 503




Internationales
Esperanto-Messetreffen
Leipzig, 9.-11. 3. 1979

III/18/210 Lp G 541/79




E-Klubo (Stempel)
901 K-M-Stadt
Muschke Str. 6
Kulturbund